

Enhavo

- **anoncoj**

Say what? Esperanto artists featured in Atlanta magazine; Jubilea jaro de la Aŭtuna Renkontiĝo; Ĉu vi Esperantumas?; Korespondi deziras

- **leterkesto**

Ekvaciaj korektoj; Interretaj kongresoj kaj la stato de nia planedo

- **Antaŭen kun novaj strategioj!**

de la prezidanto - Orlando E. Raola

La tutmonda esperantistaro sub la gvido de UEA havas novan strategian planon, nia landa asocio ankaŭ havas novan planon... Sufiĉas la planado, nun venas la tempo agi.

- **NASK: mia unua sperto pri usona Esperantujo**

loke - Kim Young-Long

Antaŭ ol mi translokiĝis al Usono en 2012, mi havis pri ĝi du stereotipajn supozojn: unue, ke usonanoj ĝenerale ne interesiĝas pri fremdaj lingvoj, inkluzive de Esperanto. Due, ke Usono estas tiel granda lando, ke esperantistoj tie ne ofte povas kuniĝi por kunvenoj.

- **Mia sperto en NASK – mia sperto en Esperantujo**

loke - Minjo Renaud

Jen la rezulto de mia sperto: tiu kurso intensa ebligis al mi elpaŝi ekster la nekomforta situacio de la eterna komencanto.

- **Raporto pri la Landa Kongreso**

loke - Vilĉjo Harris

Pli ol 70 esperantistoj partoprenis la kongreson en Raleigh, inkluzive de eksterlandanoj el 14 landoj.

- **Honore al William HARMON**

loke - Charlie Galvin

Vilĉjo kaj Lusi Harmon estis inter la unuaj samideanoj, kiujn mi renkontis tiam, kiam mi esperantistiĝis en la jaro 1985. Mi tiam enviis la fluecon kaj erudicion de la parolado de Vilĉjo (dum mi penis memori "Kiel vi fartas?"). Mia lingvokapablo evoluis kun praktiko, sed mi ne povas konvinki min, ke mi iam estos tiom bona oratoro.

- **Solvo de la "trinkajo-truko"**

enigmo-solvoj - Hoss Firooznia

Gratulon al niaj gajnintoj Arlyn KERR kaj Russ WILLIAMS! Ludoviko multe dankas al ili, pro ilia savo de lia trinkajfirmao.

- **"Varma"**

senintenca esperantaĵo? - Larry Bennett

Larry kaj Anna BENNETT sendis tiun ĉi foton de restoracia ŝildo en Islando. Eĉ se la manĝaĵo ne aparte bongustas, laŭnome ĝi almenaŭ promesas malfrostigi siajn gastojn...

ISSN: 1056-0297

Usona
Esperantisto
Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2013:4 (jul-aŭg)

American Esperantist
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2013:4 (jul-aug)



Ĉi-numere:

- De la prezidanto: Antaŭen kun novaj strategioj!
- Raportoj pri la Landa Kongreso kaj NASK
- Solvo de la "trinkajo-truko"
- ...kaj multe pli!

La Landa Kongreso omaĝas al Vilĉjo HARMON pro lia senlaca laboro por Esperanto en Usono kaj tutmonde

Say what? Esperanto artists featured in Atlanta magazine

In July, Jeff Baxter of ArtsATL magazine in Atlanta published an article featuring artists who create works in Esperanto. Titled *Say what? Century-old dream gets new life as artists worldwide embrace Esperanto*, it touches upon the music of Lou Harrison, *Kajto*, Brazilian rapper *To-Ne*, and France's *La Pafklik*. Our own prodigy Tim Westover is also featured for his work *Marvirinstrato*. See the full article at ArtsATL magazine [<http://www.artsatl.com/2013/07/esperanto-arts/>].



Jubilea jaro de la Aŭtuna Renkontiĝo

De la 12-a ĝis la 14-a de Oktobro (Dank-Festo en Kanado, Kolumbo-Festo en Usono) la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE) okazos en Silver Bay, Novjorkio. Venu ĝui la belegan gastejon apud lago, la amikecan etoson, la internaciecon de la ĉeestantaro kaj la varian programon.



ARE kunigas esperantistojn el nordorienta Ameriko dum tritaga semajnfino. Organizas ĝin la Esperanto-Societo Kebekia lige kun aliaj Esperantaj asocioj kaj kluboj en Usono.

Dum pasintaj jaroj partoprenis 50 ĝis 80 esperantistoj ĉefe el Ontario, Kebekio, Novanglio, Novjorkio, sed ankaŭ el Britujo, Germanujo, Svisujo, kaj eĉ el Japanujo. La plej juna aĝis 2 kaj la plej aĝa 80!

Invitu viajn familianojn kaj konatojn ĉar la gastejo situas apud lago en tre bela montara regiono kie ili povos ripozi dum vi esperantumos. Venu ĝui internacian amikan etoson.

Por pli da informo, vidu la paĝaron de ARE ĉe la Esperanto-societo Kebekia [<http://www.esperanto.qc.ca/eo/are/>].

Ĉu vi Esperant-umas?

En la Junia/Julia numero de la gazeto **AARP** aperis ludo nomita *Do You Esperanto?* de Stephanie SPADACCINI. La ludo konsistas el granda krado de literoj en kiu kaŝiĝas 28 vortoj. Inter la diversaj kaŝitaĵoj troviĝas la grava vorto *AKVO*, sed ankaŭ *BIERON* (eĉ pli grava), kaj kompreneble *NECESEJO* (eble la plej grava).



Trovinte ĉiujn 28 vortojn, oni aranĝas la restantajn literojn por formi nomojn de iamaj subtenantoj de la lingvo: Leo TOLSTOY, J. R. R. TOLKIEN, Jules VERNE kaj Pope Paul II.

Korespondi deziras

Mi estas kongano, tridek-jaraĝa, loĝanta en rifuĝejo en Zimbabvo. Mi longe interesiĝis pri Esperanto kaj mi deziras korespondi aŭ amikiĝi kun samideanoj eksterlande.

Nyemya Alepembwe



<ericalepembwe@gmail.com>

Ekvaciaj korektoj

Mi ŝatus sciigi vin kaj la aŭtoron pri tri eraretoj enŝteliĝintaj en la interesan artikolon de Barry FRIEDMAN pri diferencialaj ekvacioj (*UE* 2013:3). Tiuj eraretoj kuŝas en la tri ekstertekstaj ekvacioj.

1. La unua ekvacio devus esti

$$dN / dt = -\lambda N$$

(kun minussigno). La tialo estas la jena. N estas la (pozitiva) kvanto da radioaktiva substanco, kiu malkreskas, kiam la tempo t antaŭeniras. dt estas tre malgranda tempero (ni supozu ĝin pozitiva). dN estas la (tre malgranda) kvanto da substanco aldonata al N dum tiu tempero. Tiu dN ĉiam negativas, kiam dt pozitivas. Do dN / dt ĉiam negativas. Sekve, ĉar λ pozitivas, devas esti minussigno en la priparolata ekvacio.

2. La dua ekvacio, estante nur rearanĝo de la unua, devus esti

$$dN / N = -\lambda dt$$

3. En la tria ekvacio la necesa minussigno ĉeestas, sed mankas le eŭlera konstanto e . Ĝi devus esti

$$N = N_0 e^{-\lambda t}$$

— Francisko LORRAIN,
<francisko.lorrain@mac.com>

Interretaj kongresoj kaj la stato de nia planedo

Mi dankas al s-ro Orlando E. RAOLA pro lia pensiga artikolo pri Esperanto kaj la homa pluvivado sur “la bela, blu-verda planedo Tero”.

En sia artikolo, s-ro Raola mencias vojaĝadon al la landa kongreso en Norda Karolino kaj al la Universala Kongreso en Rejkjaviko, Islando. Per la frazo pri tiuj kongresoj li donas al siaj legantoj fortan ideon pri la haltigo de klimataj ŝanĝoj: la transformado de Esperanto-kongresoj de eventoj kiuj postulas nenecesan vojaĝadon al eventoj en kiuj oni povas partopreni interrete, sen vojaĝado.

Evidentiĝas ke esperantistoj jam alkiutimiĝis al la uzado de siaj komputiloj por la interŝanĝado de informoj kaj kulturaĵoj. Spertuloj pri la uzado de komputiloj kiel iloj de kreado povos liveri al ni esperantistoj travivaĵojn kiuj instruos al ni, distros nin, kaj konigos al ni aliajn mondopartojn, kaj ebligos al ni rapide interŝanĝi mesaĝojn kun aliaj esperantistoj sen la uzado de aŭtoj, trajnoj, aŭ avioj — do, sen plua kreado de gravaj problemoj en la natur-medio. Tiuj elektronikaj kongresoj samtempe helpus al la gepatroj de junaj infanoj, maljunuloj, handikapuloj, kaj aliaj personoj kiuj malfacile vojaĝas pro diversaj kialoj.

Ni malfermu niajn imagopovojn al la kreaĵeblaj de interretaj kongresoj kaj ni malfermu niajn moralajn sensojn al la nuna kaj estonta statoj de nia planedo pro necesa vojaĝado. Tiel, ni scios kiel agi.

— Erik FELKER

Skribu al Usona Esperantisto!

Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri io lastatempe aperinta en *UE*. Leteroj estu prefere ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, ne pli ol 400. Sendu mesaĝojn al la redakcio.



Antaŭen kun novaj strategioj!

Orlando E. RAOLA

Lastatempe finiĝis en Rejkjaviko, Islando, la 98-a Universala Kongreso de Esperanto. Mi ĝuis la honoron esti nomumita de la estraro de UEA kiel reĝisoro de la kongresa temo. Dum tri sesioj ni diskutis pri: “Insuloj sen Izoliĝo: por pli justa komunikado inter lingvo-komunumoj”. Unue okazis enkonduka prelego, kie mi reliefiĝis la kaŭzojn de izoliteco kaj la fakton, ke el izoliteco estiĝis kultura kaj lingva diverseco. En nia planedo ni loĝas sur insuloj diversaj: geografiaj, historiaj kaj sociaj. Mi menciis, ke ne ĉiuj konsekvencoj de izoliteco estas malbonaj kaj forigindaj, ĉar nenion ni vere gajnos se ni loĝos en mondo tute homogena kaj senvaria. Sekvis analizo pri la eblecoj forigi insulan izolitecon provizitaj de la modernaj komunikiloj, kaj speciale de la ĉiam pli kreskanta Interreto. Sed oni konstatis, ke temas nur pri eblecoj, ĉar se la lingvaj baroj daŭre staros, ne gravas kiom efikajn teknikaĵojn ni posedos, ankoraŭ ni ne sukcesos paroli unu al la alia.



Orlando en sia islanda “kostumo”.

Konklude venis la demando, “Kiel ni trovos elirejon?”, kaj la analizo de pluraj eblaj respondoj: a) teknologia solvo, b) unu el la historie avantaĝaj

naciaj lingvoj fariĝos la komunikilo tutmonda, c) planlingvo fariĝos la interkultura komunikilo. Kompreneble, ni estas pacaj batalantoj cele al solvo (c).

Sekvis sesio kie pluraj el la kongresaj partoprenantoj prezentis siajn proprajn ideojn kaj solvojn rilate la kongresan temon: Amri WANDEL detale priskribis la novajn eblecojn enkondukitajn de Google-tradukilo kaj de la reto ĝenerale por faciligo de komunikado inter lingvokomunumoj; Wally DU TEMPLE atentigis la ĉeestantojn pri la fizikaj minacoj al la insulaj komunumoj starigitaj de la nuntempaj klimatsanĝoj okazantaj sur nia planedo; Mirielle GROSJEAN rakontis pri insulo Sankta Petro sur svisa lago, kie la ĝeneva filozofo Jean-Jacques ROUSSEAU izolite loĝis kaj medititis. Poste la partoprenantoj disiĝis en malgrandajn grupojn por pludiskuti la aferojn, kaj dum la lasta kunsido, ni kune laboris sur la malneto de kongresa rezolucio, kiu resumas ĉiujn verojn eltrovitajn, kaj kiun vi povas sendube legi kaj trastudi ĉe la UEA-retejo [http://www.uea.org/dokumentoj/rezolucioj/UK_2013.html].

Dum la preparlaboroj por tiu ĉi partopreno, mi trovis pecon de malnova anglalingva literaturo (John DONNE, 1624), kiun mi multe ŝatis, kaj iel penis verŝi en Esperanton. Mi dividas ĝin kun vi, karaj legantoj, kaj esperas, ke vi provu ankaŭ trovi la originalon, kaj legi la poemon en ambaŭ lingvoj:

Neniu homo estas insulo, entute per si mem
Ĉiuj homo estas parto de la kontinento
Se terpecon englutas la oceano
Eŭropo malpliĝas
Same se ĝi forglutas duoninsulon
Same se ĝi forglutas la bienon de via amiko
aŭ eĉ vian propran bienon.
La morto de ajna homo malpliigas min
ĉar mi ekzistas kunlige al la homaro
Pro tio, neniam ekdemandu, kiun la sonorilo
mortsonoras
Ĝi mortsonoras vin.

Sed la kongresa temo estis nur parto de la kongreso. Mi volas reliefigi nun alian parton, eĉ pli gravan. Dum la kunsido de la Komitato de UEA, la komitatanoj aprobis la novan Strategian Planon de la asocio, verkitan de komisiono sub la gvidado de la nove elektita asocia prezidanto Mark FETTES.


Mi promesas por estontaj numeroj de *UE* detalan analizon de la novaj strategiaj agadkampoj, kie la tutmonda asocio kaj ties landaj asocioj (ekzemple Esperanto-USA) koncentru kaj aldirektu la fortojn. Ili estas:

- **Konsciigo** (modernigi la publikan bildon pri Esperanto, krei multlingvan reton de subtenantoj, varbi, trejni kaj interligi aktivulojn),
- **Kapabligo** (multigi trapasantojn de kursoj kaj ekzamenoj, disvastigi aktivulan trejnadon, emfazi tutmondecan edukadon),
- **Komunumo** (renovigi, popularigi la servojn de UEA, faciligi la partoprenon en kulturaj, fakaj agadoj, disvolvi solidaran helpagadon), kaj

- **Kunordigo** (plibonigi kaj disvolvi la organizan kernon, profundigi la laboron kun la landaj asocioj, plisani kaj plivastigi la financojn)

Mi konscias, ke la sinsekvo de komencliteroj de la strategiaj kapvortoj estas fakte malbelsona por usonaj oreloj, sed ni konsciu pri tio, ke temas pri hazarda koincido kaj montru nian internaciecon per ignorado de tiu ĝena detalo.

Do, karaj asocioj: la tutmonda esperantistaro sub la gvido de UEA havas novan strategian planon, nia landa asocio ankaŭ havas novan planon, kiel vi povos legi sur la raporto pri ĉi-jara landa kongreso... Sufiĉas la planado, nun venas la tempo agi.



Orlando E. RAOLA

Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio.

<oraola@gmail.com>

NASK: mia unua sperto pri usona Esperantujo

KIM Young-Long



Lernantoj en la supera klaso ĉe NASK.

Antaŭ ol mi translokiĝis al Usono en 2012, mi havis pri ĝi du stereotipajn supozojn: unue, ke usonanoj ĝenerale ne interesiĝas pri fremdaj lingvoj, inkluzive de Esperanto.

Due, ke Usono estas tiel granda lando, ke esperantistoj tie ne ofte povas kuniĝi por kunvenoj. La unuan stereotipon malpravigis mia unujara loĝado en Usono. Tio instigis min partopreni en NASK ĉi-jare, kaj la kursaro malpravigis la duan stereotipon.

Kiel internacia studento en usona universitato, la plej gravaj problemoj por mi estis sociaj eventoj: babilado, drinkado, kaj festoj. Mi ne povis esti tiel babilema kaj amuza en la angla, kiel mi vere(!) estas en la korea. Mi ĉiam klopodis trovi temojn, kiuj interesas ankaŭ alilandanojn. Iam mi hazarde diris, ke mi estas flua esperantisto, kaj preskaŭ ĉiuj amikoj surpriziĝis. Al mi, la afero estis ankaŭ surpriza ĉar ili almenaŭ konscias pri Esperanto. Ĝi ne estas kutima afero en Koreujo, almenaŭ laŭ mia sperto. Mia unua stereotipa supozo estis malpravigita. Usonanoj havas intereson pri fremdaj lingvoj, sed ili ne tiel sentas devon aŭ avantaĝon lerni ilin.

Kuraĝigite de tiu malpravigo, mi komencis ŝerĉi iun ajn Esperantujojn en Usono. La unua evento kiu kaptis miajn okulojn estis NASK. Tuj mi alfrontis realajn problemojn por partopreni en ĝi. Multe kostas por veturi nur de Bostono al Raleigh! Veturado neniam estis problemo por mi en Koreujo, ĉar la plej longa vojo daŭras ne pli ol kvin horojn, eĉ

sen flugo. “Mi supozis prave”, mi pensis: Usono estas tiel granda lando, povas facile kuniĝi. Tamen tiu dua stereotipo estis malpravigita de NASK-anoj kiuj vojaĝis al Raleigh de diversaj partoj de Usono kaj aliaj amerikaj landoj. Kvankam ili bezonis pli da tempo, mono, kaj klopodo ol mi por veturi al Raleigh, tiun penon superis ilia pasio al Esperanto.

Dum la ok tagoj de NASK ni havis matenajn kursojn je la 8:30 atm, eĉ dum la semajnfino. Mia naiva deziro havi semajnfinojn estis tute rompita de la nerezistebla pasio de la kursanoj. Kursoj en mateno unue ĝenis min, sed mi pli kaj pli konstatis, ke matena kurso estas tre efika por vekigi mian cerbon al esperantumado dum la tago. La *NASK-a Fasko*, nia ĉiutaga ĵurnalo, ne estis unudirekta reklamilo sed multdirekta komunikilo en nia NASK-komunumo. Mi kredas ke ĝi estas valora arkivo por ambaŭ partoprenintoj kaj nepartoprenintoj (eĉ mi nun estas leganta ĝin denove por rememori la sperton!)

La supernivela kurso ĉefe temis pri la historio de la Esperanto-movado. Plej impresis al mi la liberaj kontribuoj de samklasanoj. Nia instruisto kaj gvidanto José Antonio VERGARA ĉiam bonvenigis iujn ajn ideojn aŭ demandojn kaj pedagogie rilatigis ilin al la ĉeftemo de leciono. Precipe, nejunulaj samklasanoj ŝajnis al mi kiel vivaj historiuloj de Esperanto. Iliaj spertoj kaj ideoj fariĝis brikoj de la granda domo Esperantujo. Krom fari la kursan laboron, mi provis riĉigi mian lingvoscion per novaj vortoj. Mi kaptis multajn uzindajn vortojn de la buŝoj de samklasanoj.



Instruisto José Antonio VERGARA montras sian loĝlokon sur giganta terĝlobo ekster la Muzeo pri Naturscienco en Raleigh.

Dum la diplomceremonio de NASK, mi diris ke mi timas forlasi Esperantujon kaj reveni al Usono. Mi

elkore esperis, ke Esperantujo tiel multe plivastiĝos, ke mi neniam devos forlasi ĝin. Post mia unua sperto pri Esperantujo en Usono, tiu timo tuj ŝanĝiĝis al mia nova motivo dum mia ĉeesto ĉi tie: mi devos pli multe okupiĝi ne nur pri mia laboro, sed ankaŭ pri plivastigo de Esperanto en Usono. Fine, mi dankas al ĉiuj samideanoj, kiuj revenigis min al Esperantujo materiale kaj morale.



KIM Young-Long

Young-Long esperantistiĝis en 2001 kaj vojaĝis per (kaj por) Esperanto al diversaj landoj, i.a. Ĉinujo, Japanujo, Vjetnamujo, Nepalo, Kubo, Litovujo, Pollando kaj Ĉeĥujo. Li transloĝiĝis de Seŭlo al Masaĉuseco en 2012 por studi ĉe

la Universitato Clark.

Mia sperto en NASK – mia sperto en Esperantujo

Minjo *RENAUD*



Minjo (maldekstre) instruas la dancmetodon de Margaret MORRIS al lernantoj kaj instruistoj ĉe NASK.

Mi ne elektis la kurson, mi sekvis mian edzon, sed mi elektis sekvi. Sekvi kiel? Mi partoprenis ĉion, kion mi povis partopreni, inkluzive aktivecojn proponitajn (go-ludon, turismajn vizitojn...) kaj ne proponitajn (frizbiludon en la gimnastikejo, viziton al trinkejo...), ĉiujn okazojn esti kune, babilante kaj aŭskultante. Jen la rezulto de mia sperto: tiu kurso intensa ebligis al mi elpaŝi ekster la nekomforta situacio de la eterna komencanto.

Mi havis la privilegion ĉeesti dum la sekva Landa Kongreso la prelegon de Orlando RAOLA, “Por ne plu esti eterna komencanto”. Li komparis la lernadon de

lingvo kun tiu de biciklado. Kvinjara, mi lernis rajdi biciklon kaj memoras tre bone la malfacilecon konservi ekvilibron kaj regi la manieron antaŭeniri. Tiuj du trejnadaj estas iom similaj, kaj la deziro progresi enŝovas sin en la procezo strebi al mova facileco aŭ parola libereco.

En tiuj dek du tagoj, mi trovis ilojn por plibonigi mian lernadon. Mi devas trovi multajn ŝtupojn por fari veran ŝtuparon: aŭskulti radion, legi gazeton, iri al renkontiĝo, skribi, preni tempon por fari ĉiun tagon iomete. Nun mi sentas min sur lernado-vojo mia, kun helpo evidente de Francisko, mia edzo, sed ankaŭ kun la partoprenantoj de NASK-2013. Multan dankon al ĉiuj, interalie al niaj instruistoj, kiuj vigligas kaj daŭrigas la Esperantan komunumon.

NASK estis impulso por serĉi mian lernplezuron en kreiva medio tre multfaceta.



Minjo *RENAUD*

Naskiĝinta de itala patrino kaj franca patro, apud la landlimo inter Francujo kaj Hispanujo, Minjo kreskadis en okcitanparolanta medio. Instruistino, ŝi transiris Atlantikon kaj loĝas en Montrealo, Kanado de pli ol tridek jaroj.

Raporto pri la Landa Kongreso

Vilĉjo HARRIS

La ĉi-jara Landa Kongreso de Esperanto-USA okazis de la 5-a ĝis la 8-a de Julio ĉe la universitato William Peace en Raleigh, Norda Karolino. Raleigh estas ĉarma malgranda urbo kaj unu el la fruaj “planitaj urboj” en Usono. La LK okazis tuj post la ok-taga Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) – la plej malnova Esperanto-kursaro en Norda Ameriko, kiu okazis en la sama loko. Do, multaj esperantistoj spertis ĝueblan 11-tagan viziton al Esperantujo.

Pli ol 70 esperantistoj partoprenis la kongreson, inkuzive de eksterlandanoj el 14 landoj: Argentino, Brazilo, Britujo, Ĉilio, Salvadoro, Francujo, Germanujo, Kanado, Koreujo, Kubo, Meksiko, Peruo, Usono, kaj Ukrainujo. Speciale rimarkinda estis la partopreno el Kubo de Prof. Ricardo Salazar CRESPO, kiu longtempe deziris viziti Usonon.



Fabjo MONTEIRO partoprenas en la Skajp-kunsido. (Foto danke al Neil BLONSTEIN.)

Dum la kongreso okazis multaj prelegoj, i.a.: Young-Long KIM dividis sian sperton pri UNO-Pac-korpuso en Libano proksime al la israela landlimo. S-ino Sherry WELLS parolis pri sia sperto rilate al la enkonduko de Esperanto al lokaj filioj de Rotario kaj ĉe Universala-Unitariana preĝejo. Ĵenja

BONDELID (aktorino en la filmo *Pasporto al la Tuta Mondo*) parolis pri Esperanta aktorado/dancado. Joel kaj Yevgeniya AMIS prelegis pri longa vojaĝo en Japanujo kun gastigo ĉe familioj. Orlando E. RAOLA prelegis pri Long-tempaj Komencantoj, kaj kiel instigi ilin antaŭeniri.

Krom prelegoj estis aliaj programeroj notindaj: Skajp-kunsido kun Ursula GRATTAPAGLIA en Bona Espero, Brazilo, programeroj pri matematiko, astronomio, kaj komputiloj, kaj estraranoj de la fonduso *Esperantic Studies Foundation* prezentis planojn por la venonta jaro.

Dum la kongreso, Chuck MAYS kaj Maigan KENNEDY registris rakontojn de diversaj esperantistoj pri siaj spertoj. La arkivo de tiuj rakontoj estos havebla en la reto.

La tradicia bankedo havis unikan temon: honorigo de William R. HARMON, kiu deĵoris kiel ĉef-delegito de UEA dum dudek-kvin jaroj. Multaj el liaj parencoj kaj amikoj venis, i.a. Mark FETTES, Humphrey TONKIN, José Antonio VERGARA, Orlando RAOLA kaj LUSI Harmon.

Kiel kutime, la distra vespero konsistis el kantado, dancado, ŝercado kaj aliaj amuzaĵoj. Vicente BEJANARO el Meksiko kantis *Nouvjork’, Nouvjork’*. Georgo BAKER prezentis novan horor-filmon *La Giganta Areneo*, unu el serio de filmoj kun parolo kaj subtitoloj en la angla kaj Esperanto.

Dum la afer-kunsido, Wally DU TEMPLE invitis Esperanto-USA-on al venontjara Komuna Kongreso en Viktorio, Kanado.



Vilĉjo HARRIS

Vilĉjo estas direktoro de la Centra Oficejo de Esperanto-USA en Emeryville, CA.

Honore al William HARMON

Charlie GALVIN

William HARMON estas ankoraŭ relative juna viro. (Demandu al mia patro, kiu havas 93 jarojn.) Tamen, post deĵori dum 26 jaroj en la posteno de ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio en Usono, li decidis, ke venas tempo por transdoni la torĉon al iu alia.

Estas malfacile imagi, kiu povus tiom efike plenumi la taskon, kiom Vilĉjo. Li estas motoro de la Esperanto-movado ne nur en Usono, sed internacie. Kiel delegito de UEA, mi multe profitis de lia helpo kaj konsilo. Ĉiu, kiu partoprenis en la Nord-Amerika Somera Kursaro kiam ĝi okazis ĉe la San-Franciska Ŝtata Universitato, memoras la piknikojn ĉe la bela hejmo de gesinjoroj Harmon. Kaj certe ĉiuj memoras la guston de *kedgeree*. Vilĉjo estas ankaŭ lerta preleganto kaj aŭkciisto (“okaze de dubo, kontrolu regulon n-ro 1”). En preskaŭ ĉio landskala, kaj multaj regionaj movadaj eventoj, li estis tie por reprezenti UEA-on, kaj memori pri la kialoj por membriĝo.



Prezidanto Orlando RAOLA omaĝas milion-stelan moneron (vidu kovrilfoton) al Lusi kaj Vilĉjo HARMON. (Pro ambaŭ fotoj ni dankas al Neil BLONSTEIN.)

Vilĉjo kaj Lusi Harmon estis inter la unuaj samideanoj, kiujn mi renkontis tiam, kiam mi esperantistiĝis en la jaro 1985. Mi tiam enviis la fluecon kaj erudicion de la parolado de Vilĉjo (dum mi penis memori “Kiel vi fartas?”). Mia lingvokapablo evoluis kun praktiko, sed mi ne povas konvinki min, ke mi iam estos tiom bona oratoro.

Tial mi miris, kiam Vilĉjo proponis al mi, ke mi estu la venonta ĉefdelegito. Mi facile komprenis, ke li deziras rezigni pri la movada laboro post longa deĵoro. Sed lia logiko por elekti posteulon restas iom nebula al mi. Tamen, mi penas laŭ mia eblo fari la taskon. Mi estas certa, ke ĉiu usona movadano, kiel mi, volas danki al Vilĉjo pro lia bona laboro. Evidentiĝis tio, dum la ĉi-jara Landa Kongreso de Esperanto-USA, kie ĉiuj surpiediĝis post lia adiaŭa parolado. Ni sentos lian mankon en la movada agado, sed ni esperas, ke ni povos daŭre profiti de lia amikeco kaj konsilo dum la venontaj jaroj.



Charlie GALVIN

Ĉarli estas oficisto ĉe malgranda advokatifirmao en San Francisko, Kalifornio. Li ŝatas legi sciencfikciajn romanojn, ludi *World of Warcraft*, kaj paroli diverslingve.

<cxarli@idiom.com>

Solvo de la “trinkaĵo-truko”

Hoss FIROOZNIJA

En N^o 2013:2 aperis ŝajne simpla enigmo pri pesado de ladskatoloj. Venis respondoj de Malachi DOANE, Joel BROZOVSKY, Arlyn KERR, Russ WILLIAMS, kaj Jessica GRASSO.

Jen rapida resumo de la enigmo:

En sia fabriko Ludoviko produktas dek du specojn de trinkaĵoj; por ĉiu speco estas maŝino kiu verŝas ĝin en ladskatolojn. Kutime, la plenaj ladskatoloj pezas po 200 gramojn. Sed pro difekto en unu maŝino, la ladskatoloj de ties speco pezas nur po 199 gramojn. Per pesilo, Ludoviko volas trovi la difektitan specon kiel eble plej efike – tio estas, per minimuma kvanto da pesoj. **Do kiom da pesoj, maksimume, devas Ludoviko fari por trovi la difektitan specon?**



Mi priskribis la enigmon per la vortoj “ŝajne simpla”, ĉar ju pli multe oni cerbumas pri ĝi, des pli multe da solvoj prezentas sin!

La plej rekta metodo por Ludoviko estas sinsekve pesi po unu skatolon el la dek du specoj, unu post alia. Se en la unua provo Ludoviko ne trovas la malpezan skatolon, li pesus skatolon de la 2-a speco. Se tiu skatolo ne estus malpeza, li provus skatolon de la tria speco. Kaj tiel plu. En la plej bonŝanca kazo, li sukcesus je la unua provo. Plej verŝajne, tamen, li bezonus pesi almenaŭ kelkfoje. Kaj **maksimume, per tiu “sinsekva” metodo, Ludoviko devus fari dek unu pesojn.**

Sufiĉe efike, ĉu ne? Nu, Ludoviko povus uzi pli efikan “duonigan” serĉmetodon. Unue li kreus grupon de po unu skatolo el la dek du specoj, kaj duonigus ĝin en du sesopojn: unu el specoj 1-6, kaj alia el 7-12. Per peso de la unua sesopo li eksciis, en

kiu troviĝas la difektita speco (kun difektita skatolo, sesopo pezus 1199 g anstataŭ 1200 g). Poste li ripetis la saman procedon, duonigante unu sesopon en du triopojn kaj denove pesante la unuan el tiuj. Tiam li eksciis en kiu triopo troviĝas la difektita speco (ĝi pezus 599 g anstataŭ 600 g). Poste li ripetis denove, duonigante unu triopon en du grupetojn: unu havus duopon, la alia nur unuopan skatolon. Se la duopo pezus 400 g, tuj finiĝus la serĉo — devas esti difektita la unuopa skatolo. Se la pezo estus 399 g, li tiam pesus unu el la duopo por finfine trovi la difektitan skatolon. Fu! Multe da klarigado, sed malmulte da pesado: **Maksimume, per tiu “duoniga” metodo, Ludoviko devus fari nur kvar pesojn!** Tiu sendube estas la plej efika solvo, ĉu ne?

Nu... efektive ne! Restas eĉ pli efika metodo. Ludoviko povus samtempe pesi unu skatolon de la 1-a speco, du skatolojn de la 2-a speco, ktp. ...kaj dek du skatolojn de la 12-a speco. Farante tion, li amasigus *sepdek ok* skatolojn sur la kompatindan pesilon! Normale, la tuta pezo estus 78 x 200 g = 15 600 g. Tamen unu speco estas difektita, do la pezo devas esti malpli ol tiom. Per la diferenco (ni nomu ĝin *n*) li povus tuj ekscii, kiu speco estas difektita! Kiel? Nu, se la diferenco estus nur 1 gramo, tio signifas ke la difektita trinkaĵo estus la 1-a. Se la diferenco estus 2, la difektita speco estus la 2-a. Se 3, la 3-a... Kaj tiel plu por la aliaj specoj.

Do maksimume, per tiu ĉi lasta metodo, Ludoviko devus fari nur unu peson por trovi la difektitan specon. (Tiel sagaca li estas!)

Mi dankas al ĉiuj niaj sagacaj partoprenintoj! Per lotumado inter tiuj, kiuj trovis la plej efikan solvon, gajnis **Arlyn KERR** kaj **Russ WILLIAMS**. Kiel premion ili ricevos po \$10-rabaton de la libroservo. Gratulon al ambaŭ!

senintenca esperantaĵo?

“Varma”

Larry BENNETT & Anna BENNETT



Membroj Larry kaj Anna BENNETT fotis tiun ĉi ŝildon de restoracio en Islando. Eĉ se la manĝaĵo ne aparte bongustas, laŭnome ĝi promesas almenaŭ malfrostigi siajn gastojn...